TOULOUSE

La ESPERANTO-KULTUR-CENTRO DE TULUZO prezentis informbudon okaze de :

1- Salono pri Regiona kaj Historia Libro, sabaton la 11an kaj dimanĉon la 12an de septembro en MURET (temo : EŬROPO).

2- Festo Forum OC kaj OC dimanĉon la 12an de septembro en TULUZO (LA MOUNEDE). Temo : nutrado kaj monda solidareco.

3- Festo de Asocioj dimanĉon la 2an de oktobro, PLACE DU CAPITOLE.

4- Semajno Animado ĉe la Universitato Paul SABATIER (de la 11a ĝis la 15a de oktobro).

Daniel MAYNAU animis debaton pri ESPERANTO.

**SUDFRANCIA ESPERANTO KURSO****C. Cayzac-700 chemin de Bellevue 34820 Assas**

La kursoj ĉiam funkcias. Enlistiĝis kvardeko da homoj. Sed ŝajnas ke multaj el ili rezignis ĉar nur dekduo regule resendadas siajn taskojn kaj kelkaj aliaj tre sporadas.

Vi memoras ke mi alvokis pli frue ĉiujn Esperantistojn de nia federacio por ke ili propagandu por la kurso kaj en ĉiuj okazoj ili kolektu novajn lernantojn. Post unu jaro la rezulto estas tute...NULO !! Eĉ ne UNU venis de nia federacio. (Krom du kiujn mi recevis de Yvette.)

Komence, mi multe baraktis : anoncoj en gazetoj, afiŝoj en taugaj lokoj, varbado parole, ktp. La rezulto estas ke mi kolektis kvardeko da komencantoj...

La kurso estas ĉiam malfermita por kiu volas lerni.

**JEFO****SEMAJNFINO**

Avez-vous entendu parler des SEMAJNFINOJ DE JEFO ? Ce sont des esperantophones qui s'offrent un rendez-vous quelque part en France ou plus loin , se font des repas typiques de la région visitée, chantent et dansent.

Sur le WEB, vous pouvez visionner leur dernière sortie du 10 au 15 septembre 1999 faite en Allemagne : <http://www.esperanto.org/jefo>

Ou bien avec WANADOO, vous cliquez ESPERANTO puis VOILA. On vous présente huit sites en France dont JEFO.

**RAPORTO PRI LA 55a I.J.K. (INTERNACIA JUNULARA KONGRESO)**

9a ĝis 16a Aŭgusto, organizita en VESZPREM, HUNGARIO (15 km de LAGO BALATON).

Estas granda sukceso ĉar pli ol 600 gejunuloj partoprenis. Inter diversaj programoj, partoprenantoj povis lerni hungarajn kaj aliajn dancojn , fari artaĵojn aŭ sendi mesaĝojn per komputiloj al internaciaj esperantistoj, kiuj ne partoprenis. La plej gravaj momentoj estis la suneklipso, kiun oni tute vidis en tiu regiono kaj ankaŭ la internacia balo, kie ĉiuj povas renkonti kaj amuziĝi kune. Tio estis unu el la plej gravaj renkontiĝoj.

La gejunuloj povos venontjare veni en Francio por partopreni « solidarajn tagojn » kaj « KAFE ».

Pri nia regiono kaj sudo ankaŭ okazis kunveno kun sudfrancoj, katalunoj, hispanoj kaj eŭskoj kiuj parolis por revigli la sudo! Ni vidos. Ĝis ! Coralie DELNATTE

**QUISSAC**

Mikaelo SIMON nous a fait parvenir la lettre suivante :

« Premièrement, j'aimerais créer un club à QUISSAC, ma ville, avec au moins dix adhérents., surtout des jeunes! Quelques-uns de mes amis sont intéressés ; le seul problème, c'est pour qu'ils apprennent la langue. Ils ont quelques notions mais ne peuvent pas trop parler avec moi ! Dommage !

Il n'y a pas longtemps, je suis passé à la télé sur la chaîne FRANCE 3, dans l'émission « PAYS GARDOIS » pour présenter la belle langue qu'est l'ESPERANTO. Peut être, cette émission a fait découvrir l'ESPERANTO à quelques personnes !

...le mardi 2 novembre, en parallèle avec le RELAIS FAMILLE DE QUISSAC, nous organiserons une animation ESPERANTO ! Par contre, il nous faudrait de la documentation, cassettes vidéo, cassettes de musique, premier cours d'ESPERANTO, listes des sites INTERNET les plus fréquentés concernant l'ESPERANTO, prospectus... !

Il n'y a pas longtemps, Monsieur SALADIN est venu présenter l'ESPERANTO à la principale et à la documentaliste de mon collège ! Ces deux personnes seraient d'accord de faire présenter l'ESPERANTO aux élèves du collège !


Comptez sur moi pour faire découvrir l'ESPERANTO à des dizaines de jeunes ! L'année prochaine, je m'attaquerai au lycée !

En vous remerciant tous pour l'aide que vous m'avez apportée ! »



## LA TUTA MONDO EN VIA HEJMO PASPORTA SERVO

Vi lernis la lingvon. Vi ŝatas ĝin, ĉar ĝi donas al vi tute novan senton pri lernado de fremda lingvo. Vi malkovris novan mondon, pri kiu vi antaŭe eĉ ne supozis ke ĝi ekzistas. Nun, vi estas preta utiligi tiun novan trezoron. Eble vi jam korespondas. Eble vi jam vizitis renkontiĝon, proksime de via hejmo aŭ en fora lando. Eble vi estas membro de Esperanto-klubo, kie vi regule parolas kaj agadas. Sed la plej facilan paŝon por ekoni la mondon vi ne jam faris. La plej proksiman lokon por renkonti homojn el aliaj kulturoj vi ankoraŭ ne malkovris. Pro tio ke vi ne jam fariĝis



### gastiganto de Pasporta Servo

#### La servo

Pasporta Servo estas unika servo de Esperanto-parolantoj al Esperanto-parolantoj. Se vi fariĝas gastiganto de Pasporta Servo, vi ofertas al aliaj Esperanto-parolantoj senpagan tranokteblecon en via hejmo. Kompreneble vi rajtas indiki laŭ kiuj kondiĉoj homoj povas tranokti ĉe vi. Vi povas peti antaŭan sciigon de gasto. Vi povas limigi la nombron de samtempaj gastoj kaj la nombron de sinsekvaj tranoktoj. Se gastigado en iu periodo ne konvenas al vi, vi rajtas tiam rifuzi gastojn. Sed: se vi akceptas gastojn, vi trovos plej interesan mondon, en via propra hejmo! Kaj se vi emas mem vojaĝi, vi disponas pri la tuta adreslibro, por senpage ĝui la gastamon de viaj kolego-gastigantoj!




#### La listo

Pasporta Servo konsistas el libro kiu enhavas la tutan liston de gastigantoj kun iliaj adresoj kaj kondiĉoj. En 1999 ĝi enhavis 945 adresojn en 76 landoj. Kiu volas uzi la servon devas unue aĉeti la libron. Sed: kiel gastiganto vi ricevas vian propran ekzempleron — senpage! En la libro vi trovos ankaŭ mapojn kun indikoj de la loĝlokoj de la gastigantoj, por helpi al vi bone plani vian vojaĝon. Krome, la reguloj de la servo estas klare priskribitaj, tiel ke ĉiuj uzantoj scias kion ili rajtas fari kaj kion ne.

#### Decidu

Ĉu vi ankoraŭ dubas? Parolu kun aliaj gastigantoj, por lerni pri iliaj spertoj. Petu pliajn informojn ĉe SFS, aŭ prenu ilin de la reto je <<http://home.wxs.nl/~lilde/paspserv.htm>>. Kaj se vi ne plu dubas, plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin antaŭ la unua de novembro al la kompilanto, por aperi en la venonta libro kaj ricevi vian propran ekzempleron senpage.

**Ĉu "Pasporta servo" atingos 1000 adresojn en la jaro 2000 ?  
Tio dependas de vi...**



## LA TUTA MONDO JE VIA DISPONO : la JARLIBRO de delegitoj de UEA . 1959 delegitoj en 100 landoj, 500 aliaj aktivuloj, asocioj, instancoj.

Ĝi restas nemalhavebla manlibro por tiuj, kiuj bezonas kontaktojn tra la mondo. Membroj de Universala Esperanto-Asocio ricevas ĝin ĉiujare. La nombro da reprezentitaj landoj kreskas ĉiujare : en 97-90 landoj, en 98-94, ĉijare 100 .

Eblas fariĝi "delegito" kaj respondi al ĉiuspecaj petoj aŭ "fakdelegito" kaj pritrakti nur la aferojn de via fako. Necesas bone regi la lingvon kaj kompreneble esti membro de UEA .

Por esti delegito, petu aliĝilon de la federacio, kiu plusendos al la ĉefdelegito de Francio, kiu mem sendos poste vian kandidatiĝon al UEA .

Jen la adresoj de delegitoj en nia regiono.


Ĉu 2000 delegitoj en la jaro 2000 ? Tio ankaŭ dependas de vi



- Béziers (Hérault) 82 000 \*  
D: s-ino Suzanne Authier, em. instruisto, 9 rue Georges Picot, 34500 Béziers;  
☎ +04 67 31 13 18.
- La Canourgue (Lozère) 2 000  
D kaj FD (turismo): Jean Hénin, lingvo-instruisto, Beauregard Route de Montcayroux, 48500 La Canourgue; ☎ +04 66 32 86 36; □ Jean.Henin@wanadoo.fr.
- Montpellier (Hérault) 300 000 \*  
D kaj FD (turismo): d-rino Yvette Vierne, kuracisto, 5 rue Docteur Roux, 34090 Montpellier; ☎ +04 67 54 15 43.  
FD (fotografio; genealogio): André Capus, emerito, 15 rue des Frères Platter, 34000 Montpellier; ☎ 04 67 63 15 21.  
FD (instruado: E-o koresponde): Claude Cayzac, em. asekuristo, 700 chemin de Bellevue, 34820 Assas; ☎ 04 67 59 55 74.  
LG: Loka Esperanto-grupo kunvenas principe la unuan merkredon de ĉiu monato (de oktobro ĝis junio) je la 18-a horo. Por koni la kunvenejon kaj por ĉiuj informoj, jen telefonnumeroj: 04 67 54 15 43; 04 67 58 64 18; 04 67 69 11 32.
- Narbonne (Aude) 65 000  
D kaj FD (esperantologio; germanistiko): Vilhelmo Lutermano, filologo, Fonto Gazela, 11360 Embres-et-Castelmaure; ☎ 04 68 45 81 32; □ 100070.2001@compuserve.com (Pyrénées-Orientales) 110 000 \*  
D: René Llech-Walter, em. eksperto pri librotenado, 72, Avenue du Général de Gaulle, 66000 Perpignan; ☎ 04 68 34 22 18.  
FD (medicino): d-ro Blaise Berthonneau, familia kuracisto, Lot. La Barnède, 2 Imp. 18 juin 1940, 66670 Bages; ☎ [h] +04 68 21 80 43, ☎ [of] 04 58 22 06 40, ☎ 04 68 22 58 90; □ boparo@aol.com.
- Peyriac de Mer (Aude) 850  
D: s-ino Annick Tora, em. flegistino, 26 Rue des Salins, 11440 Peyriac de Mer; ☎ 04 68 41 28 15, 04 67 69 11 32.




Brandenburgia  
Pordego



La germana parlamentejo  
(iama Reichstag)

Televida Turo  
en la placo  
Aleksanderplatz



## Du Montpelieraninoj en Berlino por la 84a Universala Kongreso de Esperanto

"Charles de Gaulle", flughaveno de Roissy. Jam ni estis en Esperantujo, ĉar ni tuj forgesis krokodili ! Vidu JD el norda Francio, CR el la sudo... kaj homojn el aliaj landoj... Varmego en la flughaveno, sed ni preskaŭ ne atentis ĝin, ĉar senĉese parolinte ni atingis Berlinon rapide, sed tie ni perdis nin en Tegel-flughaveno. Malgraŭ la maldensa trafiko en ĝi ni serĉis dekstre, maldekstre, ĉirkaŭe, bedaŭrinde ni rimarkis nek panelojn, nek informojn nek "bonvenon" en esperanto ! Post kelkaj malfacilaĵoj, ne parolante la germanan lingvon, ni sukcesis finfine taksii ĝis hotelo situanta sur alia flanko de Berlino. Feliĉe nia hotelo mirigis nin : grandega, komforta, modernstila. Tamen ni devis trajni dum tri horkvaronoj por rekte trafi la kongresejon. Oni aŭdis nur esperanton en nia hotelo, plenplena de gesamideanoj el diversaj landoj.



Memor-Preĝejo

Multajn konatulojn ni plezure renkontis, kun kiuj ni multe ĝojis la iradon ĝis la kongresejo per la S4, nia trajno. Je la eliro antaŭ ni grandega spacŝipo, kun verdaj flagoj kaj banderoloj, kiujn ni bone konas. Kiom da homoj irante, revenante ! Ili akompanis nin en tiu vasta loko, kie plurfoje ni preskaŭ perdiĝis.


Ekde la solena Inaŭguro ni vere ĝuis la partoprenon en la diversaj fakoj, sen premado de organizado kutime ni partoprenis la provojn de la Internacia Ĥoruso; bedaŭrinde ni konstatis la neĉeeston de Sro D. Terzief pro malsano. Simpatia junulo anstataŭis lin, sed li ne trovis salonon kun piano por prepari la internacian vesperon : nur unu sola piano en tiu "spacŝipo" !!! Stranga afero, ĉu ne ?

Buse ni vizitis Berlinon, kie restas malmultaj antikvaj monumentoj, ĉar la mondmilito detruis preskaŭ ĉion. Nun ampleksaj konstruaĵoj, gruoj sur la konstruejoj invadas placojn, stratojn, kvartalojn. Eble ni revenos post kelkaj jaroj... Eĉ hodiaŭ, post la falo de la "muro de honto", la unueco de la urbo ne vere ekzistas, ĉar la orienta parto estas tre malsimila al la okcidenta, eĉ en la mensoj de la Berlinanoj (laŭ nia intima opinio).

Dum la vizito per ŝipeto, oni bone vidas kelkajn kilometrojn de la muro, pentrita kaj kun surskribaĵoj, laŭ la rivero Spree, tiu vidindaĵo kortuŝas la vizitantojn. Ankaŭ plaĉis al ni la belaj teatraĵoj, la nacia kaj internacia vesperoj en mirinda salonego. Ne forgesante la Ekmunan Diservon en malnova kaj bela preĝejo, plenigita de almenaŭ 700 partoprenantoj, kunigitaj per la kantoj de la Ĥoruso kaj la muzikistoj de Munkeno. Inter la ekskursoj, ni ege ŝatis tiun al Potsdam, la imperiestra urbeto kun multaj kasteloj, precipe tiu de Sans-souci kun belaj ĝardenoj kaj majesteco.

Tamen la semajno finiĝis tro rapide. Iam la solena konkludo, iam la disiĝo ĝis la venonta kongreso ! Adiaŭ geamikoj, novaj kaj malnovaj ; ni revidos nin baldaŭ !

A. T. kaj R.A.R.



Ĉie laborejoj kaj gruoj (Aleksanderplatz)




Enirejo de la kongresejo



Navigado sur la rivero Spree kaj laŭlonge de la " muro de honto".



Simila al spacŝipo :  
la kongresejo



Nova kupolo de la parlamentejo



Franca gastronomio en Berlino :  
restoracio "restu fidela".

## ANEKDOTO POSTKONGRESA : La religiulinoj ("les bonnes sœurs")

En la aviadilo de kompanio "Air Littoral", de Berlino al Parizo, la stevardino kaj la komandanto parolas nur angle aŭ france. La stevardino servis al ni la tagmanĝon, la kafon kaj post la peceto de ĉokolado ŝi rigardis nin tre atente. Irante kaj revenante, ŝi rimarkis nian verdan stelon, nian ŝildon sur nia ĉemizo. Subite ŝi demandis nin :

-Ĉu vi estas membro de sekto ?

-Tute ne, ni respondis.

-Ĉu vi estas religiulinoj ?

Ni ridegis. -Absolute ne ! Ni parolas esperanton !

-Do, mi ne konis esperanton, kio ĝi estas ?

Rideme ni respondis : -la Universala lingvo ebligas al vi paroli kun la tuta homaro, ĝi utilas precipe en via laboro.

Ni aldonis plurajn klarigojn pri nia lingvo Esperanto.

-Jes, ŝi diris, en la aviadilo estas multe da vojaĝantoj, kiuj parolas vian lingvon.

-Ili revenas de la Berlina Universala Kongreso de Esperanto kompreneble !

Post kelkaj minutoj ŝi revenis al niaj seĝoj :

-La komandanto jam aŭdis pri via lingvo.

Kiam ni estis elirantaj la aviadilon, la komandanto kaj stevardino atendis nin ambaŭ por saluti nin kaj por informi pri nia bela lingvo. Ni adiaŭis reciproke preskaŭ amike.

Ne ! Ni ne estas religiulinoj, sed vere Sinjorinoj tre liberaj, ĉu ne ?

AT + RAR

## KONGRESA REZOLUCIO

La 84-a Universala Kongreso de Esperanto,

kunvenanta en Berlino, Germanujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999, kun 2712 partoprenantoj el 66 landoj;

debatinte pri la temo "Tutmondiĝo – ŝancoj por paco?";

konstatinte ke la celo de la Internacia Lingvo Esperanto ekde la plej fruaj tempoj estas liveri al la mondo egalecan formon de komunikado, kiu konservas la etnajn lingvojn por ties utiligo interne de la diversaj regionoj, nacioj kaj etnoj, kaj per tio certigas eblon de egaleca partopreno por ĉiuj popoloj en la tutmondiĝa procezo, kaj samtempe ŝirmas la kulturen multkolorcon de nia terĝlobo;

analizinte la aktualan, ĉiam pli rapidan disvolviĝon de la tutmondiĝo, kiu tamen realiĝas laŭ modelo kiu kuntrenas la elĉerpon de la naturaj rimedoj de nia planedo, t. e. de nia heredaĵo al la postaj generacioj, kaj kiu alprenas en multaj rilatoj la formon de super-regado fare de la plej prosperaj landoj de la mondo, kaj sekve elvokas la fortiĝon de naciismo kaj apartiĝemo multloke, kio siavice endanĝerigas pacon;

notinte

– ke la internacia komunumo komencis alfronti tiun problemaron ekz. per la Konferenco de UN en Rio-de-Janeiro en 1992, en kiu partoprenis la E-movado,

– ke UN, Unesko kaj la aliaj instancoj de UN devas plu havi centran rolon en la komuna klopodo por ekologia sekureco, homaj rajtoj kaj justeco en la mondo;

alvokas

– al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, al ĉiuj internaciaj forumoj, al la ne-registaraj organizaĵoj kaj al la uzantoj kaj parolantoj de Esperanto tra la mondo, doni gravan atenton al tiuj ĉi aspektoj de tutmondiĝo, kaj klopodi direkti la procezon tiel ke ĉiuj homoj de la terĝlobo profitu el ĝi. Tio povas okazi nur ĉe senkondiĉa respekto de ĉiuj homaj rajtoj, inkluzive de la rajtoj je lingva kaj kultura diverseco;

– al la ekonomie prosperaj kaj politike fortaj ŝtatoj celi ne asimilon de la cetera mondo sed unuiĝon kun ĝi surbaze de reciproka kompreno, respekto kaj reciprokaj avantaĝoj, ĉar nur tia tutmondiĝo povas garantii por la homaro solidan pacon en vera feliĉo.

## Subskribu!

La plej granda poŝtkarto de la mondo, kreita dum UK 1998, en Montpeliero, alvenis ĉi-tie por ke ankaŭ vi, partoprenantoj de la UK 1999, subskribu ĝin.


Poste, ĝi revenos al Francio por esti donacita al la Prezidanto de la Eŭropa Parlamento kiel pruvo ke Esperanto vige vivas.

El "Pordego al Kongreso",  
kuriero de la 84a U.K.

**Kulturaj ĉefurboj:** En la jaro 2000, naŭ urboj estos kulturaj ĉefurboj de Eŭropo: Bologna (IT), Bruxelles (BE), Praha (CZ), Helsinki (FI), Kraków (PL), Avignon (FR), Bergen (NO), Rejkjavik (IS), Santiago de Compostela (ES). Antaŭ pli ol 100 partoprenantoj oni raportis pri la agado rilate tiun temon kaj pri la ĝisnunaj kontaktoj kun la oficialaj organizo-komitatoj.

## Publika afiŝado

Bonvolu noti, ke surgluado de diversaj afiŝoj sur la murojn de la kongresejo estas strikte malpermesita, minace de alta monpuno!!! Eblas afiŝi sur la por tio speciale preparitaj paneloj en la enirhalo ĉe la lasta linio de giĉetoj (blua flanko, dekstre de la enirejo). Por ĉiu afiŝo necesas aprobo de LKK!



# Urbo ĉe la Maro OOSTENDE



## INVITAS VIN AL LA KVARA EŬROP-UNIA ESPERANTO KONGRESO

**EKOLOGIO, ŜLOSILO POR LA TRIA JARMILO**  
27.04 ĝis 01.05.2000 (semajnfino post Pasko)

**PROGRAMO** : **Ĵaŭdo** : la 27a de aprilo 15.00 ĝis 18.00 akceptado de la partoprenantoj en la stacidomo de Oostende kaj en la Festpalaco. 20.00h : solena malfermo en la Festpalaco de la urbo. **Vendredo** : la 28a de aprilo : kolokvo en la Eŭropa Parlamento (Bruselo) : la eŭrodeputitoj dialogas kun la eŭropaj civitanoj. 08.44 h aŭ 09.44h alveno en Bruselo., gvidata vizito en la centro de Bruselo, tagmanĝo en la Eŭropa Parlamento. 15.00h ĝis 16.00h prelegoj en la Eŭropa Parlamento. 16.00h ĝis 16.15 paŭzo. 08.45 16.15 ĝis 17.30h konkludoj. Ekde 19.03h forveturo el Bruselo al Oostende. **Sabato** : la 29a de aprilo : 09.30h : vizito al ekologia centro de Oostende (bicikle aŭ buse). Libera tagmanĝo. 14.00h : vizito al la Provinca Bieno Raversijde (La Belgaj Reĝoj, la Atlantika Muro, bieno de Princo Karel, ruinoj de iama vilaĝo, ktp). Dume, prelegoj pri la Atlantika Muro. 19.00h : bankedo kaj amuzaĵoj. **Dimanĉo** : la 30a de aprilo : 10.00 : Ekumena Diservo aŭ kunveno en la nova Laika Centro. Libera tagmanĝo. 14.00h ĝis 23.00 : marveturo al Nieuwpoort per la ŝipo Sea-Star : prelegoj pri Norda Maro kaj (mal)novaj teknologioj (sur la ŝipo). Sur la ŝipo : muziko kaj danco...por la dancemuloj ! **Lundo** : la unua de majo : 09.30h : Solena ferma de la kongreso, konkludoj(Festpalaco). Posttagmeze : ebleco de vizito al Bruĝo aŭ al aliaj interesaj lokoj. Por la hoteloj, rezervu (antaŭ 01.02.2000) rekte ĉe la **Turisma Buroo: Terisme Oostende vzw Monacoplein 2 8400 Oostende tel. ++32 59 70 11 99 (demandu « KONGRESOJ ») Fakso : ++32 59 70 34 77 Mel : toerisme.oostende@flanderscoast.be**

listo +  
tarifoj  
de SF5

Dank al la pasintaj Eŭropaj Balotoj, pluraj kandidatoj (ankaŭ novaj) sur ĉiuj listoj interesiĝas pri Esperanto kaj certigis nin ke ili partoprenos al diversaj eroj de nia estonta Eŭropa Esperanto-Unio Kongreso.

## Aliĝilo

Bonvolu resendi ĉi tiun aliĝilon al FLANDRA ESPERANTO-LIGO  
Frankrijklei 140  
2000 Antwerpen

+ 32 3 234 34 00  
+ 32 3 233 54 33  
esperanto@tel.esperanto.be

S-ro / s-ino \_\_\_\_\_

Adreso \_\_\_\_\_

Nakiĝjaro \_\_\_\_\_

Tel.: \_\_\_\_\_

La kolizo inkluzivas **trajveturadon** Oostende-Bruselo kaj revenon, **buson** aŭ **biciklon** al la Ekologia Centro kaj poste al la Provinca Bieno Raversijde (Atlantika Muro) kaj **enirprezon**. Ŝipveturadon per la Sea-Star al Nieuwpoort kun kato aŭ alia trinkaĵo, aperitivan kaj grandan garnitan bastonpanon kun trinkaĵo.

Mi pagos ĝis 10.08.1999 60 - 40\* EUR (2.420 - 1.610 BEF)  
aŭ eventuale 117 - 79\* DEM (tuj pagandaj dum la Bertina UK)  
ĝis 30.11.1999 66 - 44\* EUR (2.660 - 1.780 BEF)  
ĝis 31.01.2000 75 - 50\* EUR (3.025 - 2.020 BEF)  
poste 84 - 56\* EUR (3.390 - 2.260 BEF)

\* prazoj por junuloj malpli ol 30 jaraĝaj kaj aliĝintoj el landoj kategoria B (kp UEA)

Mi mendas la bankedon de sabato la 29a: 24,70 EUR (1.000 BEF)  
Menuo: antaŭplado, ĉefplado, deserto kaj kato, 2 trinkaĵoj.

Ne pre menciuj por la bankedo:  viandajn  fiŝajn  vegetaran menuon

Mi pagas la aliĝilkoston:

- al la pĉk 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo
- per eŭroĉeko (en eŭroj)
- per la sciigo de mia numero de VISA-, MASTER-CARD, EUROCARD- aŭ ACCES- kreditkarto per subskribita karto
- per ĝiro sur la konto fe-la-x-ĉe UEA
- rekte de mia fei-konto: \_\_\_\_\_



## Espéranto

"Midi Libre"  
13.9.99

■ Depuis juillet, la Finlande assure à la place de l'Allemagne la présidence européenne et, à cette occasion, le problème linguistique en Europe vient de resurgir. L'allemand ne bénéficiant plus d'une interprétation simultanée dans les deux sens comme l'anglais et le français, l'Allemagne soutenue par l'Autriche, menace de boycotter les réunions informelles des quinze.

Pendant ce temps, les Italiens et les Espagnols commencent à manifester leur mauvaise humeur. L'Europe ne réglerait rien durablement tant qu'elle refusera de voir les choses en face.

Il n'y a que trois solutions : soit toutes les langues sont sur un pied d'égalité (onze actuellement donc 110 services de traductions sont nécessaires ; demain 15 langues donc 210 services ; après-demain 25 langues et 610 services...); soit on laisse le système actuel en l'état avec deux langues, l'anglais et le français, jusqu'au jour où l'anglais sera la seule langue comme c'est le cas à l'ONU ; soit enfin une étude est demandée pour envisager l'usage de l'espéranto comme solution au moins optionnelle pendant une période probatoire de quelques années.

Dr Thierry SALADIN  
(Montpellier)

■ Encore une fois, *Midi Libre* (l'Allemagne relance la querelle des langues de travail dans l'Union européenne/6 septembre dernier), aborde dans un article le problème des langues dans l'Europe communautaire. Mais si ce problème est résolu par la force (économique, financière) en imposant l'anglais (ou l'allemand ou le français) à l'Europe, on trouvera le même phénomène qu'aux États-Unis : la création de ghettos en fonction de la langue maternelle.

Je rappelle qu'il existe une solution reconnue par l'ONU et l'UNESCO : celle d'une langue neutre et internationale, l'espéranto qui, en protégeant les langues maternelles, permettrait à tous les Européens de se comprendre en évitant les inégalités dues à une langue nationale dominante.

Francis BERNARD  
(Le Mas-Saint-Chély)

### Langues :

Le débat sur les langues minoritaires a duré plusieurs mois. A droite un extrait du courrier des lecteurs de "Marianne" du 4 octobre (E°, le recours) Des courriers de lecteurs ont également paru dans "Midi Libre", dont plusieurs d'espérantistes.

L'information suivant laquelle l'Allemagne demandait le même statut pour sa langue que l'anglais et le français a également provoqué les réactions des lecteurs et un beau doublé sur l'espéranto a paru dans le "Midi Libre" du 13/9.

On s'inquiète maintenant de la perte d'influence du français dans les instances européennes. Ci-contre article de C. Nay dans "Valeurs" du 9 octobre.

Même si cela ne fait pas les gros titres, le prix "Carpette anglaise" sera attribué le 14 octobre, à l'occasion de la rentrée littéraire, par différentes associations oeuvrant pour la langue française.

Parmi les pressentis : Claude Allègre, Martin Bouygues, Bernard Kouchner, Marc Lassus, Alain Minc, Christian Noyer, Louis Schweitzer. Ce dernier, par exemple, a décidé de tenir les réunions hebdomadaires de Renault, de faire rédiger et diffuser les comptes rendus... en anglais. Bernard Kouchner, le délégué de l'ONU au Kosovo et ex-ministre, s'adresse aux médias en anglais uniquement. Son épouse, Christine Ockrent, présentant son dernier livre "L'Europe racontée à mon fils" (Ed. R.Laffont) disait, parlant d'une langue commune pour l'Europe : "il est assez probable qu'une sorte d'anglais appauvri tiendra ce rôle dans les communications de base, sans pour autant que les différentes littératures en souffrent. On parlera anglais, ne nous cachons pas derrière notre petit doigt, mais cela n'est pas vraiment important". Kio do gravas ?

### Congrès :

Comme le rappelle l'illustration en bas et à droite, le prochain congrès universel d'UEA aura lieu en Asie, à Tel-Aviv, du 25 juillet au 1er Août 2000 (du mardi au mardi). UFE organise une caravane. Rappelons que la limite de la 1<sup>o</sup> période pour les adhésions est le 31 décembre (bulletins d'adhésion disponibles à SFS). Les moyennes de juillet pour Tel-Aviv sont : 12h de soleil par jour, 0 mm de pluie, températures de 22 à 31 degrés. Par comparaison, Perpignan : 10 heures, 25 mm, 19 à 29°. Même si les brises marines, les lieux climatisés apporteront un peu de fraîcheur, il fera beau et chaud !

Après Tel-Aviv, Zagreb (Croatie) en 2001, Fortaleza (Brésil) en 2002. Congrès des jeunes : après Hong-Kong (Chine) en 2000, peut-être la France (Alsace) en 2001. Si vos déplacements sont limités, il ne manque pas de possibilités à proximité, à commencer par le congrès transpyrénéen à la fin de ce mois à Manresa. Sur les différentes rencontres, des informations peuvent être obtenues auprès de votre bulletin "Sudfrancia Stelo" (adresse en dernière page). Ne vous contentez pas d'être espérantiste, participez et pratiquez aussi !

Tio gravas.

## Espéranto : le recours

A L'ÉPOQUE de l'Union européenne, il devient nécessaire que les hommes se comprennent malgré les frontières et, pour cela, ils doivent pratiquer une langue commune. Cette langue commune doit respecter toutes les autres langues et toutes les cultures. Ce ne peut pas être l'anglais ni aucun idiome national [...]; l'espéranto peut jouer un rôle positif dans le contexte européen [...].

J. CHAMPION, MISEREY


### Strasbourg : les Français absents

► L'abandon progressif de la langue française à la Commission de Bruxelles a ému nos concitoyens. Hélas, à Strasbourg, c'est le même tabac, le français fout l'camp. Charles Pasqua, qui préside le groupe de l'Union pour l'Europe des nations, vient d'envoyer une lettre à Nicole Fontaine, la présidente du Parlement européen, pour lui dire son mécontentement de n'avoir pu disposer en temps et en heure utiles de documents en français. En attendant, il lui annonce que les membres de sa délégation s'abstiendront de participer aux travaux du Parlement.

Si M. Pasqua a raison de se battre pour notre langue, il a tort de choisir la politique de la chaise vide. Parce que c'est justement l'absentéisme caractérisé des Français au Parlement de Strasbourg qui est la cause de cette perte d'influence.



# KRUCVORTOJ :



Solve de la numero 148

I	L	E	K	S	I	K	O	L	O	G
II	O	N	O	M	A	T	O	P	E	E
III	K	A	M	E	L	L	A	R	O	
IV	S	N	R	S	I	N	T			
V	O	T	N	A	G	I	T	K	E	R
VI	D	E	F	L	O	R	O	R	O	
VII	R	M	D	R	I	V	A	P		
VIII	O	O	E	F	I	N	E	R	C	I
IX	M	F	U	L	G	O	R	S		
X	I	Z	O	G	E	O	T	E	R	H
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

Solve de la numero 149

I	S	V	P	O	Z	I	T	O	R	I
II	V	P	A	N	I	S	A	D	O	J
III	P	A	N	C	R	A	M	A	I	O
IV	E	S	T	K	T	L	E	B		
V	R	A	M	O	R	T	I	Z		
VI	L	A	G	U	N	A	S	I	R	
VII	A	G	R	I	M	E	K	I		
VIII	T	A	V	O	A	L	A	V		
IX	I	P	E	R	I	T	T	R	A	
X	V	A	L	E	R	I	A	N	E	L
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

## HORIZONTALE

- I) Grad(o).
- II) Iama bovino / Kontraŭsence.
- III) Biblia moner(o) / s : Kritiko / Centr-eŭropa
- IV) Mov-analizil(o). river(o).
- V) Kiel suda vento.
- VI) Ne plu trinkebla / Metal(o).
- VII) Pronomo / Lirika strofo.
- VIII) Firme konservi.
- IX) Retroveturi / Televidil(o).
- X) E-a kromnomo.

## VERTIKALE

s : sone

- 1) Double vort(o).
- 2) Necesil(o) / Adverbo.
- 3) Laŭ francoj aĉa vin(o) / Knabaĉ(o).
- 4) Azia monunu(o) / Elektra unu(o) / Norda monero.
- 5) Sesedr(o).
- 6) Sesedra uj(o).
- 7) Meze de gamo / Parfum(o).
- 8) Azia versaret(o) / Radike por Reĝo Lear.
- 9) Trojonto / Lignopec(o).
- 10) Flugiloj sub luno.

BOPARO.

## MODIFITAJ LITEROJ

SOLVO de n°150 : Suno, luno, lumo, zumo, zomo, zono  
 Suno, puno, pano, lano aŭ pago, lago  
 Suno, suko, tuko, tujo-tufo, bufo, budo, ludo, lado, lago  
 -tulo, tolo, volo, valo, vago, lago .

bero ----- falo  
 bero ----- ĉino  
 bero ----- sano

karto ----- pordo

karto ----- festo

pomo ----- sano

pomo ----- relo

## RENDEVIJ POR LA VENONTAJ MONATOJ

Iuj datoj estas konfirmotaj

- 29 X - 1 XI : Sète, konferenco pri esperantologio
- 30 X : Montpellier, ĝenerala kunveno de Réinsertion et E°
- 30 X-1 XI : Kataluna kaj transpirena kongreso en Manresa
- 2 XI : Tago de E° en Quissac
- 24-28 XI : Parizo, salon de l'éducation (Expolangues, ktp)
- 4 XII : Béziers, Zamenhofa tago
- 1-2 IV : Franca kongreso en Loudéac
- 8 IV aŭ 3 V : federacia kongreso
- 22-25 IV : Fouquières lez Lens, kongreso de Sat-Amikaro
- 27 IV-1 V : Oostende (B), Eŭropa kongreso
- 30 V - 7 VI : Agde, staĝo de Batipaume
- 5-9 VII : Tuluzo, Kafe (kultura festivalo de esperanto) en Julio : kongresoj de TEJO en Hong-Kong, UEA en Tel-Aviv kaj SAT en Moskvo
- 26 VIII-2 IX : Sète, internacia semajno

**Limdato por la venonta SFS, kiu aperos komence de januaro : la fino de decembro.**  
 Bonvolu sendi viajn kontribuojn al  
 SFS ĉe Jean Hénin  
 Beaugard-Route de Montcayroux  
 48500 La Canourgue Tel/Fax 0466328636  
 Jean.Henin@wanadoo.fr Anticipan dankon !